

BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 9a — Novembro 1954a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktejo-Administrejo:
ĉe la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

NIA JUBILEO

Tiu ĉi estas la numero de novembro kaj la administrantaro de nia Ligo decidis festi solene la oran jubileon de Reĝa Belga Ligo Esperantista, en la monato de februaro 1955a.

Tio signifas, ke niaj antverpenaj amikoj disponas pri nur tre mallonga tempo por organizi la festan semajnfiron.

Ili tamen kutimas organizi festojn, ankaŭ esperanto-festojn, kaj ni povas fidi la Komitaton kiu, gvidata de nia ĝenerala sekretario, S-ro Henri Sielens, ilin organizos.

Sed festo de jubileo signifas, en unua loko, ke oni volas honorigi la fondintojn, kiuj plej grandparte kompreneble malaperis, ĉu pro bedaŭrinda posta malinteresiĝo, ĉu, plejparte, pro la senkompata Morto.

Kaj krom la fondintoj la administrantaro decidis ankaŭ honorigi speciale la veteranojn kaj la efektivajn jubileantojn, t.e. tiujn membrojn de nia Ligo, kiuj aliĝis antaŭ almenaŭ 25 jaroj.

En lokaj Grupoj, la estraro povas jam festi kaj honorigi membrojn, kiuj dum malpli da jaroj, apartenas al nia movado... Sed sur la nacia kampo, ŝajnas ke la argenta jubileo devas esti la unua festinda kaj festenda.

Ĉar la estraro nepre deziras ne esti kulpa, nek respondi pri ia forgeso dum la festotagoj, ĝi deziras, - ekde nun, - meti la Grup-gvidantojn, la membrojn de Grupoj kaj la izolajn membrojn antaŭ siajn respondecojn.

Estos honorigataj kaj citataj nur tiuj membroj, kiuj mem estis informintaj, ĉu la prezidanton de R.B.L.E., ĉu la prezidanton aŭ sekretario de la loka grupo al kiu ili pagas sian kotizon.

Do ne hezitu, en tiu ĉi okazo, paroli pri vi mem, skribi malgrandan karton, en kiu vi citos la daton de via esperantistiĝo, de via aliĝo al grupo aŭ ligo, la funkciojn kiujn vi eventuale en la pratempo aŭ dum postaj jaroj plenumis en iu el la esperanto-organizaĵoj.

Kaj tiurilate ni dezirus scii, por ĉiuj

niaj malnovaj membroj, ĉu ili, en la daŭro de la jaroj, apartenis al la gvidantaro de R.B.L.E., de B.E.I. aŭ de loka Grupo; ĉu ili estis delegitoj de U.E.A. (aŭ I.E.L.) ĉu ili kaj kiam ili gvidis kurson, ĉu ili faris publikajn paroladojn, kiam kaj kie; ĉu ili eventuale en gazetoj aŭ alimaniere prizorgis la propagandon de nia lingvo... Tiu cito de funkcioj aŭ laboroj ne estas kompreneble limiga, ĉar ĉio kio rilatas nian movadon estas interesa, je momento kiam oni volas skribi la historion de nacia Ligo.

Kaj fine ni nin turnas tutspeciale al la malnovuloj, kiuj povus havigi al ni materialon kiun ajn, pri la pratempoj de nia movado; dokumentoj kiaj ajn estas bonvenaj kaj ni jam danke ricevis statuton de malnova, de longe malaperinta grupo, kune kun malnovaj eldonaĵoj propagandaj de nia Ligo.

Lasta alvoko estas, ke ĉiu informu nin pri la iamaj membroj de nia Ligo. el la tutmalnova periodo, kiuj ne plu estas membroj de nia organizaĵo, sed pri kiuj oni scias ke ili ne tute indifereentiĝis pri nia internacia lingvo.

Ni efektive intencas skribi al tiuj personoj individuajn leteron, per kiu ni atentigas ilin pri la organizotaj festoj

La nederlanda jurnalo „Het Parool” publikigis du longajn artikolojn (Vidu la artikolon: „La angla, mondolingvo?” p. 1.—) unu por Esperanto. Kiun verkis s-ro Mason Stutterd kaj unu de d-ro G. A. Dudok, docento pri angla literaturo ĉe la Komunuma Universitato en Amsterdam, kiu pledis por la uzo de la angla lingvo kiel internacia. Enketo kombinita kun la artikoloj rezultigis, ke 94,9 procentoj de la abonantaro preferas la enkondukon de Esperanto kiel lingvo internacia. Nur 5,1 procentoj kontraŭis la enkondukon de Esperanto. Kvankam la rezulto kompreneble ne prezentas objektivan bildon pri la vera situacio, tamen estas ĝojige, ke tiom da personoj pledis por la uzo de Esperanto.

kaj informas ilin, ke ni deziras havi, dum tiuj tagoj ĉirkaŭ ni, kiel eble plej multnombrajn veteranojn de nia movado.

Post lasta alvoko, lasta demando: Kiam vi estos leginta tiun ĉi artikolon, ne formetu ĝin antaŭ ol vi dum duonminuto pripensis, ĉu vi, persone, ne havas ion tuj komunikotan al ni, responde al tiu ĉi artikolo... Se jes... ne atendu: prenu simplan poŝtkarton kaj sendu ĝin al ni.

Kaj koran dankon diras jam nun al vi
Maur. Jaumotte.

La Angla, Mondolingvo?

Amiko enmanigis al ni la aldonon de la gazeto „Het Parool” de la 4-a de sept. pasinta (no. 2959), en kiu oni povis legi artikolon „Por kaj Kontraŭ” pri Esperanto. La „Por” verkis s-ro Mason Stutterd, la „Kontraŭ” d-ro G. A. Dudok, privat-docento pri la moderna angla literaturo kaj la metodiko kaj didaktiko de la angla ĉe la Komunuma Universitato en Amsterdamo.

Memkompreneble la „Kontraŭ” plej interesis nin. Nu, s-ro Dudok skribis ke li preferas la anglan kiel mondolingvon pro jenaj motivoj:

a) Ĉirkaŭ 300 milionoj da homoj parolas ĝin en teritorio, dissemiĝita tra la tuta mondo;

b) Jam miloj, ekster la angla ling-

vo-teritorio, lernas ĝin pro praktikaj motivoj;

c) La angla superas aliajn multe parolatajn lingvojn (ekz. la hispanan kaj rusan) ĉar ĝi havas simplan gramatikon: unu artikolon por la tri genroj singularaj kaj plurale, simplan konjugacion, malmultajn deklinaciajn finaĵojn, kio favoras la lernadon.

d) Pro ĝia ĝerman-romana karaktero ĝi havas riĉan idiomon, kio krome pliiĝas ĝian lerneblon por la ĝermanaj kaj romanaj popoloj.

e) La literaturaj kaj sciencaj produktoj donis al la angla, kiel kultur-lingvo, grandan signifon.

Ni detale esploru tiujn punktojn.

a) Estas fakto ke la angla estas

dissemita tra granda parto de la mondo kaj ke milionoj parolas ĝin. Sed oni ne neglektu ke ekz. la amerika ne estas precize la sama kiel la angla, parolata en Anglujo. La praktiko jam pruvis ke erara vort-elekto ebligas miskomprenojn.

b) Tiu punkto ne havas multe da valoro por ni ĉar ankaŭ la francan, germanan aŭ italan oni multe lernas! Ĉu ni ne prave demandus kie do estas kiuj lernis la anglan, kiam montriĝas el la praktiko ke oni ne ricevas ian respondon kiam oni surstrate aŭ ie ajn intence alparolas iun en la angla? Tiurilate ni ankoraŭ bone memoras ke, ĉe la Liberiĝo, la Komandanto de la kanadaj Trupoj en norda Nederlando petis per anoncetoj kelkajn interpretistojn, sed akiris ja nenian.

c) Ni volonte akceptas ke la angla gramatiko estas pli simpla ol la hispana aŭ rusa sed estas rimarkinde ke la elementoj, substrekitaĵ de d-ro Dudok, sammezure validas por Esperanto dum ĉi tiu krome ne konas esceptojn do ankaŭ ne neregulajn verbojn, tiel ke tiurilate Esperanto estas pli facila ol la angla.

d) Ankaŭ Esperanto posedas ĝermanajn kaj romanajn elementojn kaj krome ankaŭ slavajn, tiel ke ĝi estas same facile lernebla kiel la angla ne nur por la ĝermanaj kaj romanaj popoloj sed ankaŭ por la slavaj. Aldonu ke Esperanto, pro sia aglutina karaktero iel similas ekz. la japanan, tiel ke ĝi neniel ŝajnas same stranga kiel la angla por la orientaj popoloj kaj do estas pli facile lernebla por ili, kion jam pruvis la praktiko.

e) Pro ĝiaj literaturaj kaj sciencaj produktoj d-ro Dudok opinias la anglan tre signifoplena. Sur tiu kampo ni rimarkigu ke tiu signifo ne tiom dependas de la lingvo mem kion de la verkoj, aperintaj en ĝi, verkoj kiuj naskiĝis el la homa spirito kaj fiksiĝis pere de la lingvo.

En ĝenerala senco lingvo estas rime-do por esprimi la homajn pensojn kaj sentojn kaj estas egale ke tiucele oni uzas ĉu la anglan, francan aŭ alian lingvon. Se ne estus tiel, maleblus traduki verkon de unu lingvo en alian. Tial ne estas mirige ke multaj verkoj en diversaj lingvoj, kiuj havas grandan kulturvaloron, estas tradukitaj en Esperanton. Esperanto posedas verkojn ekz. de Shakespere, Ibsen, Dante, Goethe, Schiller, Vondel, Frederik van Eeden, Modach, ktp. El tio rezultas ke Esperanto taŭgas por esprimi pensojn kaj sentojn same bone kiel iu ajn lingvo.

En sia artikolo d-ro Dudok tamen koncedas ke la silabado kaj elparolo de la angla estas malfacilaj kaj ke oni devus simpligi ilin por ke la angla taŭgu kiel mondlingvo. Tute trafe, sed kiu simpligus ĝin? Ĉu la angloj mem? Tiam ni prave timu ke ni aten-

Kroniko de la Historio

Evoluo de kutimoj

En la daŭro de la regno de imperiestro Karlo V-a (unua duono de la 16a jarcento) komenciĝis en nia lando tre granda ŝanĝiĝo en la vivo de la nobeloj kaj de la burĝoj. La ĉiama kutimo, fiksita de la tradicio, cedis la lokon por la portempa modo kiun la t.n. alta klaso alprenis por apartigi sin de la „malalta“ popolo. En tiu oni vidas ankaŭ la foriron de la komunumec-idealo kaj solidareco de la Mezepoko, kaj la alvenon de la individuec-idealo de la *Renaissance*. Tiuj modoj aliĝis loĝejojn, kutimojn, plezurojn, ĝentilec-regulojn, manĝadokutimojn ktp.

La kasteloj ĉesis esti fortikaĵoj kaj iĝis agrablaj domoj en la kamparo. (Estas ankaŭ vere ke la senĉesaj feŭdaj militoj inter nobeloj apartenis jam al la estinto). La riĉaj familioj plie posedis hotelon en la urbo kie ili pasigis la vintron.

La amuziĝoj ne plu estis tiel bata-laj. La batalludo fariĝis skermado per spado kies origino situas en Hungarujo. La turniro ŝanĝiĝis en karuselo: lerteca ludo sur ĉevaloj, veninta el Italujo.

Estas pli malfacile (kaj tro longe) priskribi la ŝanĝiĝojn de la vestaĵo kiu estis tiel varia. Ĝenerale la vestaĵoj de la virinoj komplikiĝis, kun

dos ankoraŭ longe! Ne, ĝuste tiuj ortografio kaj elparolo de la angla nenligas ĉiujn argumentojn de d-ro Dudok kaj tial estas por ni tute nekompreneble kiel li preferas ja la anglan. Versajne la deziro naskis la opinion dum oni samtempe pretervidis la praktikajn barojn, ligitajn al ĝi. Des pli ĉar d-ro Dudok mem kredas ke la angla ne estos akceptata kiel mondlingvo ĉar, malgraŭ ĝia taŭgeco tiucele, tio povus vundi la nacian fieron de aliaj popoloj. El tiu vidpunkto artefarita lingvo havus pli da ŝancoj, ĉar tie ne validas mallarg'anima naciismo.

Ni ne diskutos ĉu oni ĉi-kaze parolu pri naciismo, sed ni nur rimarkigu ne oni ne malkovras, en la pledo de d-ro Dudok, iun logikan gvidlinion. Ni havas la nepran konvinkon ke d-ro Dudok ne scias ion pli pri Esperanto ol kion li citas el kaj legis en la verko de d-ro Manders. Tio ne sufiĉas se oni volas juĝi pri Esperanto en ties plena amplekso. Se d-ro Dudok estus ĉeestinta la Haarleman kongreson li verŝajne ne estus skribinta ke antaŭe necesas plia eksperimentado inter diversaj rasoj kaj klasoj, ĉar ili vere superfluas kiam oni konstatas ke okaze de niaj kongresoj, reprezentantoj de diversaj rasoj, klasoj kaj instru-teco intersangas siajn pensojn pri ĉiaj temoj... en Esperanto.

F. WEEKE.

rigidaj formoj kaj eksterordinara amplekso. La vestaĵoj de la sinjoroj iĝis kaj restis alĝluigemaj al la korpo ĝis komencigo de la 17a jarcento, kaj tiam malrigidaj kaj facilmovaj kiel ilin portis Rubens.

Depost la 16a jarcento ekzistas tre multaj kaj tre variaj dancoj kiuj, venintaj el la eksterlando, invadis la kortegojn de Bruselo kaj Mehleno, kaj estis ĝenerale malrapidaj kaj majestaj en kiuj kavaliroj kaj sinjorinoj tenis unu la alian nur per la mano.

Plej ŝanĝiĝis la manieroj. Por manĝi, ĉiuj konis nur kuleron kaj tranĉilon. Oni prenis la viandon el la plado per la mano kaj tranĉis ĝin sur dika pantranko. Nur en komenco de la 17a jarcento, la „alta“ klaso ĉesis manĝi „kiel la kamparanoj“ kaj alprenis la forketon, venintan el Venecio. Depost tiam oni disponigis ankaŭ teleron por meti viandon sur ĝin. En tiu sama tempo, la manĝohorĝoj, kiuj restis ne-pre senŝanĝaj sur la kamparo (t.e. matenmanĝo je leviĝo; tagmanĝo je la 10-a, kaj vespermanĝo je la 17a h.) estis pli malfruigataj en la urboj kaj en la kortegoj. Tiel venis la nun ankoraŭ ekzistantaj tagmeza tagmanĝo kaj la 19hora vespermanĝo.

Nova ĝentileckodo tre rapide disvastiĝis ĉe nobeloj kaj burĝoj. Ĝi reguligis la salutadon, la akcepton de gastoj, la lokigon ĉirkaŭ tablo, la leterkribadon kun la diversaj salutformuloj laŭ rango de la adresato ktp. Tiuj reguloj estis plej strikte observataj. (Memoru la komikajn teatraĵojn de Molière). Ege malfeliĉe, tiu ĝentileckodo nenion ordonis pri korpa pureco. Oni ne banis sin! Estas sciite ke la ĉefdukino Isabella portis la saman ĉemizon dum tri jaroj! Sekretaj memornotoj el tiu tempo rakontas ke ŝiaj manoj estis ĉiam malpuraj kaj la ungoj „funebrantaj“! La lavvazoj por vizaĝoj kaj manoj restis ĝis fino 18a jarcento vere tro kaj tro malgrandaj. Nek virinoj nek viroj prizorgis sian vizaĝon. Tio faris ke je la 40a jaraĝo ili montris sulkojn, estis malglataj kaj aspektis multe pli maljunaj ol ili vere estis.

En la urboj nenio estis antaŭvidita aŭ aranĝita por forpreni la malpuraĵojn. En la domoj la nomo kiun oni donis al la necesoj (gemakken, lieux d'aisance: facileclokoj) montras ke oni konsideris ilin kiel luksojn. Kaj tio ĝis la dua duono de la 19a jarcento!! Kaj en tiuj lokoj oni kompreneble tute ne uzis akvon. Nun kiam la higieno tiel enpenetris, oni malfacile imagas ke antaŭ nelonge ankoraŭ ekzistis tiaj situacioj... ĉe ankoraŭ ekzistas en kelkaj landpartoj de nia civilizita Eŭropo.

Drs. Fernand Roose.

POEZIO

Komence de ĉi tiu rubriko ni havas la gojon represi kontribuon — tradukon en versoj — de nia resaniĝinta amiko H. VERMUYTEN, kiun feliĉe ne daŭre „faligis“ trafik-akcidento: koran bonvenon al li. La originalo estas poemo de Prof. P. N. Van Eyck, la konata nederlanda beletristo, kiu mortis en aprilo pasinta en Hugo.

PREPARO

(Ik zal nog met U wandlen)

P. N. VAN EYCK (1887-1954)

Promenos man-en-mane
Kun vi, amikoj du,
Mi post la last-vekiĝo
En land' alia plu.

Sed mi ankoraŭ vagu.
Prefere en silent'
De la montet-deklivo
Ĉe l'bordoj de la Brent'.

Tra l'bruetanta herbo
Susuris tie spir',
Somere en vespera
Varmeto kaj malbril'.

Kuŝante mi ĝin aŭdis,
- Subite en liber' -
Ankaŭ tra mi susuris
Ĝi de herb- al herber'.

El mi, ni ĉiuj vivis
De nura la spiret', -
Kiom mi ofte serĉis
Ĉi lokon de kviet'!

Jes, restu ĝis finvenos
La dormo, mi vagant'.
El ĝi l'eterna mio
Vekiĝos en ĉi land'.

trad. H. Vermuyten

(El „Preparo“ - 1926)

LA FORLASITO

(Postkristnaska Kanto *)

I

Abieto forlasita,
Forlasita en angul',
Jam vi estas forgesita,
Forgesita de l'festul'!

II

Dum la Kristonasko, celo
De plej flata Komentar',
Ĉiu juĝis vin la stelo
El la tuta abiar'.

*) Verkita de S-ro H. Castel, kun muziko de S-ro D. Van der Stempel.

Niaj Veteranoj

Ni kredas ke la nombro de niaj veteranoj t.e. de tiuj, kiuj esperantiĝis antaŭ pli ol 40 jaroj, do antaŭ la unua mondmilito, ne estas plu tre granda.

Tial ni volas dediĉi, se eble, al ĉiu el ili, kiuj restis fidelaj al nia movado kaj ankoraŭ estas membroj de nia Ligo, kelkajn liniojn.

Ni komencos hodiaŭ per esperantista portreto, ne de la plej malnova sed de tiu inter la veteranoj, kiu ankoraŭ nun ludas plej gravan rolon, nia vicprezidanto:

Joseph SOYEUR

kiu esperantiĝis la 12an de decembro 1908.

Tiun tagon estis starigata la Grupo de Seraing, kies titolo estis: „Groupe Esperantiste Sérésien — Sereza Grupo Esperantista“, kies statuto estis aprobat dum la ĝenerala kunsido de la 2a de januaro 1909; kiu petis sian aliĝon al Belga Ligo en oktobro kaj estis akceptata dum la Ligestrara kunsido de la 21a de novembro 1909.

La unua prezidanto de tiu ĉi grupo estis S-ro Ch. Wilmotte, baldaŭ anstataŭota de la advokato Jongen, kaj la unua sekretario estis S-ro Joseph Soyeur.

Kaj ke la movado jam tuj estis vigla en tiu lieĝprovinca regiono, pruvas kelkaj memoraroj de la juna sekretario, kiu ĉeestis, dum somero 1909, informigan kunsidon pri U.E.A., en Huy kaj kiun prezidis Abato Richardson, vicprezidanto de B.L.E.

La 19an de decembro 1909 sekvis en Lieĝo, intima festo, okaze de la 50a datreveno de la naskiĝtago de la Majstro, kaj kiun ĉeestis grupanoj el Lieĝo, Verviers, Huy, Beyne-Heusay kaj Seraing, entute ĉirkaŭ 80 personoj kaj al kiu alportis la saluton de la Ligo, nia bedaŭrata posta Ligprezidanto S-ro Frans Schoofs, tiam juna prezidanto de „La Verda Stelo“.

La 15/16an de majo 1910, S-ro Joseph Soyeur ĉeestis, en Bruĝo, la 2an nacian kongreson, dum kiu li renkontis la tiutempajn gvidantojn, S-rojn Van der Biest, Witteryck, Champy, Swagers, Oscar Van Schoor, k.t.p. kaj famajn francajn samideanojn i.a. Carlo-Bourlet, profesoro en Sorbonne, Barono kaj Baronino De Menil (li aŭtoro de la muziko por „La Espero“) k.t.p. Ni memorigu ke tiu kongreson ĉeestis proks. 350 kongresanoj.

La 4/5an de junio 1911, S-ro Soyeur ankaŭ ĉeestis la 3an belgan kongreson en Charleroi kaj poste, en 1913, ankaŭ tiun en Charleroi.

Pri la posta kunlaboro de S-ro Soyeur, ni hodiaŭ ne detale parolos... Io devas ja resti por la oficiala honorigo.

Ni volis nur hodiaŭ jam atentigi pri unu el la malnovaj figuroj, por ke neniu forgesu helpi nin al la konigo de la aliaj.

III

Pasis tago, pasis gloro,
Pasis gloro de la fest':
Restas, de girland' aŭ oro,
Eĉ ne ero sur la vest'.

IV

Same, foje kredas homo
Je la ama eterneĉ',
Car lin logis, de fantomo,
Iluzia la beleĉ'.

V

Pasas tago, pasas amo,
Pasas amo kaj ador',
Restas nur, el ĝia flamo,
Brula vundo ĉe la kor'.

VI

Kaj la homo dolorita
Jen sin sentas la kunul'
De l'abio forlasita,
Forlasita en angul'.

MEMORAĴO

En vian manon mi metis mian koron
Dum vi bedaŭron esprimis per okulo,
Kaj lastrigarde en ĉi iris an oron
Mi adiaŭis ĉe la peron-angulo.

Jen amikeco profunde spontanea!
La monotono de mia kor' refluoris,
Kaj ŝajndormanta en la brud' kupea
Intimajn scenojn mi ŝate rememoris.

Vi forkaresis - ja kiel ĉe infano -
La ĝendoloron de miaj du kul-pikoj,
Kaj kiam skribas al vi ĉi tiu mano
Sekretalvokas mi por samaj kisaplikoj.

Anna Meurrens

LA MISVOJO

Himno de la pesimistoj *

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvo po miloj.
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron,
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiujni provas, versante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.

LA GIMNAZIO

de: Salom Alejhem

(Komenco: antaŭa numero)

el la hebrea: d-ro L. L. Zamenhof

Sed mi estas ja viro, ne virino, tial mi trankviliĝis kaj diris al mi: estu la afero propeka ofero, hebreo ja alkutimiĝis... Sed iru, parolu kun ŝi! Ŝi enbatis en sian kapon la frenezajn, unu fojon por ĉiam, ne pre devas esti gimnazio! Mi parolas al ŝi: „diru al mi, mia kara, por kio vi tion bezonas? Kontraŭ la milita servo? Li, dank' al Dio, estas ja garantiita“, mi diras, „li estas ja solinfano; por laborenspezi“, mi diras, „mi ankaŭ bezonas tion kiel balaaĵoj; kion“, mi diras, „ĝi min malhelpas, se li estos butikisto simile al mi, aŭ komercisto simile al ĉiuj aliaj hebreoj? kaj se eble la sorto decidis, ke li estu riĉulo, bankiero, tio min ankaŭ ne afliktus“. Tiel mi parolas kaj admonas. Sed ĉu la muro ion aŭdas? „Pli bone estas“, ŝi diras, „ke li ne eniris en la „mladše prigotovitelne“; ne granda malfeliĉo; pli bone estos, se li eniros, rekte en la „starše prigotovitelne“ 4). — Nu, kion fari! Vi volas „starše prigotovitelne“, — estu „starše prigotovitelne“; ĝi certe estas por mi tre grava afero! la knabo havas ja kapon, kian vi ne trovos, eĉ se vi traveturos tutan imperion... Sed kio estis la fino? Kiam venis la ĝusta prezentigo, li denove ricevis „du“, jam ne de matematiko: lia skribado estas ne tute, kiel oni bezonas! tio estas, li skribas bone, sed nur pri unu litero li estas iom ne tute en ordo, pri la litero „jat“ 5) por diri pli ĝuste, li skribas ĝin, la literon „jat“ — kial li ĝin ne skribas? Sed lia malmerito estas, ili diras, li skribas ĝin ne tie, kie oni devas. Efektive, granda malfeliĉo! Mi tute ne scias, kiamaniere mi veturos al Poltavo aŭ al Lodz por la foiro, se li, Dio gardu, ne skribos la „jat“ tie, kie ili tion deziras! Nu, mi diras al vi, kiam oni sciigis al ni la novaĵojn, tiam ŝi, kompreneble, fariĝis tute furioza: ŝi flugis al la direktoro, ŝi klarigis, ke la knabo ĉion bone scias, ke li en ĉio estas forta; por pruvo, ŝi diris, oni lin voku, oni lin ekzamenu denove, de la komenco... Kompreneble, oni ŝin atentis, kiel la pasintjaren negon; oni enskribis „du“ -on, kaj ankoraŭ kiam duon! duon kun minuso! 6) kaj nun kuru kaj insultu!... Komencigis kriadu kaj tumulto: mia Dio, denove li ne sukcesis en la ekzameno! „Nu, kio do estas?“, mi diras al ŝi, „kion fari? Ĉu ĝi valoras, ke oni pro tio venenu al si la vivon? Hebreo“, mi diras, „ja alkutimiĝis“... Tiam ŝi, kompreneble, ekflamas kaj komencas ĵetadi fajron, malbenojn kaj insultojn, tute laŭ ilia maniero... Sed tion ni lasu, — vere kompatinda estis li mem, la malfeliĉa knabo, kaj la koro doloris, kiam oni lin rigardis. Tia malfeliĉo! Ĉiuj ornamas sin per blankaj butonoj 7), kaj li tion ne povos fari!... Mi

diras al li: „kia malsaĝulo vi estas, simpla azeno vi estas! Ĉu estas eble, ke la tuta mondo eniru en la gimnazion? Malsaĝuleto mia“, mi diras, „iu devas ja resti hejme, ĉu ne vere? kaj se vi zorgas pri la milita servo“, mi diras... Tiam ŝi fariĝas kolerega kaj furioze min atakas: „bela kompatemulo“, ŝi diras; „kiu vin petas“, ŝi diras, „ke vi lin konsolu per tiaj saĝaj paroloj? Pli bone estus“, ŝi diras, „se vi penus, ke ni ricevu por li ian taŭgan instruiston“, ŝi diras, „apartan, rusan por la gramatiko“.

Vi aŭdas? jam du instruistojn mi devas teni! unu instruisto kaj unu melamedo 8) jam ne sufiĉas! Unuvorte, disputo post disputo. Venkis kompreneble ŝi, ne mi; ĉar ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi“ volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Oni prenis novan instruiston, jam rusan, ne — Dio gardu — ian hebrean, ŝi, sed efektivan kristanon; ĉar gramatiko, vi komprenas, por eniri en la unuan klason, estas ja pli akra ol kreno; bagatelo, la gramatiko, la litero „jat“!... Nu, se mi volus rakonti al vi pri la instruisto, kiun Dio al ni sendis, estus simple honto rakonti: ni devis suferi de li plej venenitajn tagojn, li nin ĉiujn traktadis kiel senvalorajn bestojn, li ridadis kaj mokadis nin ĝuste en la vizaĝon. Li, ekzemple, — en la infero li brulu — dum la instruado de la gramatiko ne povis trovi ian alian vorton krom „ajlo“ 9), t. e. ruse „ĉesnok“: „ĉesnok, ĉesnoka, ĉesnoku, ĉesnoko!“ 10)... la diablo lin prenu! Se ne estus „ŝi“, tiam mi prenis lin ĵe la kolo kaj elĵetus lin al ĉiuj diabloj kun lia bela gramatiko! Por „ŝi“ ĉio estis tolerebla: ĉar la knabo ja scios, kie oni devas skribi la literon „jat“, kaj kie oni ne devas ĝin skribi! Nu, prezentu al vi, dum la vintro oni lin sufiĉe elturmentis, kaj nur ĉirkaŭ Pentekosto li devis iri al la buĉo. Kiam pasis Pentekosto, li iris kaj starigis al la ekzameno kaj alportis hejmen jam ne „duon“ sed „kvaron“ kaj „kvinion“ 11). Ĝojo, triumfo! Gratulon, gratulegon!... Sed atendu, ne tiel rapidu kun la gratulo; oni ne scias ankoraŭ tute precize, ĉu li estas akceptita; oni tion scios ne pli frue ol en Aŭgusto! Kial nur en Aŭgusto? kial ne tuj? Iru, demandu ilin! Sed kion fari? Hebreo ja alkutimiĝis...

Venis Aŭgusto; mi rigardas, — mia kunulino ne ripozas: de la direktoro ŝi kuras al la inspektoro, de la inspektoro al la direktoro... „Kial vi kuradas hodiaŭ“, mi diras al ŝi, „kiel venenita muso, de Abraĉjo al Jaĉjo?“... „Kial mi kuradas?“ ŝi diras; „Ĉu vi ne estas ĉi tieulo! Ĉu vi ne scias do, kio fariĝas en la nuna tempo en la gimnazioj, kun

la procentoj?“ 12)... Nu, mia sinjoro, kio montriĝis? li ja efektive ne estis akceptita! Vi volas scii, kial? Tial ke li ne ricevis du „kvinojn“. Se la ambaŭ notoj, kiujn li ricevis, estus kvinoj, tiam, ili diras, li eble estus akceptita. Vi aŭdas? „eble“? kiel plaĉas al vi la „eble“? Nu, kion mi havis de ŝi, pri tio mi ne parolos; vere kompatinda estis li, la knabo: li kuŝas kun la vizaĝo kaŝita en la kuseno, kaj li ne ĉesas plori. Tio daŭris tiel longe, ĝis fine oni devis preni por li novan instruiston, ĝuste studenton de la gimnazio, kaj oni komencis preparadi lin jam por la dua blaso, en tute alia maniero, ĉar la dua klaso ne estas bagatelo: por ĝi oni bezonas jam, krom matematiko kaj gramatiko, ankaŭ geografion kaj kaligrafion kaj kun mi ne scias kio ankoraŭ. Kvankam, por diri al vi la veron, mi por ĉio kune ne donus eĉ tri spesiojn: peceto da talmuda komentario estas multe pli malfacila ol ĉiuj iliaj lernadoj, kaj eble ankaŭ pli saĝa... sed kion fari? hebreo alkutimiĝis...

Unuvorte, komencigis tuta serio da lecionoj. Li leviĝas tre frue — la lecionoj; li faris la matenan preĝon kaj matenmanĝon — la lecionoj; la tutan tagon — la lecionoj. Ĝis malfrue en la nokto oni aŭdis, kiel li tamburas: „nominativo“, „akuzativo“, „adictivo“, „multoblativo“... ĝi simple skrapas la orelojn. Kiu pensas pri manĝo, kiu pensas pri dormo? „Oni prenis malfeliĉan infanon“, mi diras, „kaj oni turmentas ĝin sen kulpo kaj sen kaŭzo! Ĝi estas ja vera kompatindaĵo“, mi diras, „la infano — Dio gardu — ja malsaniĝos!“ — „Formordu al vi la langon“, ŝi diras. Nu, kion vi volas? li iris ankoraŭ unu fojon al la buĉo, kaj li alportis de ĉiuj ekzamenaj objektoj purajn „kvinojn“, nenion krom „kvinoj“! Ne mirinde! li havas ja tian kapon, kian vi ne trovos, se vi eĉ traveturos tutan imperion; kaj krom tio tia diligenta, tage kaj nokte li nur lernadis kaj ripetadis! Sekve estas ja bone? jes? Sed kiam venis la ĝusta tago, oni elpendigis en la gimnazio la nomaron de ĉiuj akceptitaj infanoj, — ni rigardas — nia tie ne estas! Komencigis kriadu, ploregado... Kiaraj-te? tia maljustego! puraj „kvinoj“ de ĉiuj objektoj! Ha, ŝi kuros, ha, ŝi kuros, ha ŝi faros tion kaj tion... Unuvorte, ŝi iris, ŝi iris, ŝi faris tion kaj tion... tiel longe, ĝis oni ŝin petis, ke ŝi ĉesu tedi al ili la kapon, tio estas, parolante inter ni, oni ŝin simple forpelis. Jes. Kaj kiam oni ŝin fine forpelis, tiam ŝi kun granda vekriado enfalis en la hejman domon: „Ha“, ŝi krias, „kia patro vi estas! se vi estus“, ŝi diras, „sindonema patro, varma, kiel ĉiuj aliaj patroj, tiam“, ŝi diras, „vi ankaŭ trovus protekton, kiel la aliaj, al la direktoro protekton, konatecon, tion, alion...“ Kiel plaĉas al vi la virina ideo? „Ĉu ne sufiĉas“, mi diras, „ke mi devas konstante memori pri la pagodatoj,

pri la foiroj, pri la ŝuldatestoj, pri la kambioj, pri la protestoj kaj la diversaj aliaj malbenajtoj? Eble vi volas, ke mi fariĝu bankrotulo pro via gimnazio kaj viaj klasoj, kiuj alrampis al mi jam ĝis la ĝorgo?“ Vi eble pensas, ke ŝi aŭdas, kion mi parolas al ŝi? Tute ne, nenia atento! Ŝi daŭrigas sian faradon: ŝi segas kaj fajlas kaj boras kaj mordetas kiel vermo, tage kaj nokte, tage kaj nokte. „Se via edzino“, ŝi diras, „estus por vi edzino kaj via infano estus por vi infano, se mi havus por vi“, ŝi diras, „eĉ plej malgrandan valoron, almenaŭ iometan...“ — „Kion do“, mi diras, „tiam estus?“ — „Tiam“, ŝi diras, „vi kuŝus eĉ mi profunde en la tero, mi vin enterigus trifoje ĉiutage, vi ne povus eltombiĝi eĉ en la tago de la mondfina juĝo!“ Nu, kiel plaĉas al vi tia saluto? Tio estas simple, kiel oni diras, kapti edzon kaj fari al li subitan banon per sitelo da akvo, pro la ĉarma paco! Kompreneble, mi miaflanke ankaŭ ne silentas, ĉar oni estas ja, kiel oni diras, nur homo, kaj ĉiu homo havas ja galon... Fortemin enŝi vi tamen ne bezonas, kaj venkis kompreneble ne mi, sed ŝi; ĉar se „ŝi“ volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Mi komencis serĉi protekton, konatecon, tion, alion; mi lasis min moki, mi suferis honton, ĉar ĉiu demandas tute prave: „vi estas, sinjoro Arono, estimata hebreo, vi estas domhavanto, kaj vi havas nur unu solan filon, kia do demono vin instigas, ke vi puŝigu kun li tien, kien oni ne devas?“... Nu, iru, rakontu al ili historion, ke mi posedas propran edzinon — cent dudek jarojn ŝi vivu, — kaj ke ŝi enprenis al si en la kapon frenezajn ideojn: gimnazio, gimnazio kaj gimnazio! Nu, kio estis plue? Vi devas scii, ke mi mem ankaŭ ne apartenas al tro grandaj mallertuloj, kun helpo de Dio mi trabatis al mi vojeton rekte tien, kien estis necese, kaj mi trafis en la kabineton de la granda sinjoro mem, la gimnaziestro. Jes! Kaj mi sidigis kaj komencis paroli kun li tiel kaj tiel — mi kapablas, dank' al Dio, paroli kun granda sinjoro, se mi nur volas, piki al mi la langon oni ne bezonas. „Kion vi deziras?“ li min demandas kaj petas min sidigi. Kaj mi respondas al li mallaŭte en la orelo: „Plej moŝta moŝto“, mi diras, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon kiu“, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino tre volas...“ Tiam li denove demandas min: „Kion vi deziras?“ Tiam mi respondas al li denove kaj mi alŝoviĝas al li ankoraŭ pli proksime: „plej moŝta moŝto“, mi diras, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon, kiu“, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino tre volas...“ kaj mi forte

akcentas la „tre“ por ke li min komprenu... Sed li havas ja gojan 13) kapon, tial li ne komprenas, kion mi aludas, kaj li diras al mi jam kolere: „kion do vi deziras?“ Tiam mi nerapide enŝovas la manon en la poŝon, nerapide elprenas kaj nerapide diras al li: „pardonu min“, mi diros, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon, kiu“, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino tre volas...“ Kaj mi prenas kaj enŝovas al li kaj premas al li la manon... Unuvorte, li komprenis, kion mi pensas, kaj li elprenas notlibreton kaj li demandas min, kia estas mia nomo, kia estas la nomo de mia filo en kaj en la kioman klason mi volas lin enirigi...

(Daŭrigota)

4) Starsij prigotovitelnij klass (ruse): pli progresinta prepara klaso.

5) La sono „je“ en la rusa lingvo estas skribata en multaj vortoj ne per la litero „je“, sed per speciala litero „jat“.

6) La signo „minuso“ iom malpligrandigas la valoron de la ekzamena noto.

7) La gimnazianoj en Rusujo portas uni-

formon kun blankaj butonoj.

8) „Melamed“ estas persono, kiu instruas hebrean lingvon, Biblion kaj Talmudon.

9) Per ĉi tiu vorto la rusoj ofte mokas la hebreojn.

10) Imitata deklinacio de la vorto „ĉesnok“.

11) La noto „kvar“ signifas „bone“, la noto „kvino“ (plej alta noto) signifas „bone“.

12) En Rusujo la lernado por la hebreoj en la nuna tempo estas afero tre malfacila. En la gimnazioj kaj en la universitatoj oni akceptas la hebreojn nur en la nombro de difinita procento rilate la nombron de ĉiuj aliaj lernantoj. En la pli granda parto de la lando la lernejoj akceptas hebreojn nur en la nombro de 3-5 procentoj; en tiuj urboj, en kiuj la loĝantaro konsistas preskaŭ ekskluzive el hebreoj, la gimnazioj akceptas nur 10 % da hebreoj, t. e. inter 10 lernantoj oni akceptas nur unu hebreon. Tiamaniere el ĉiuj hebreoj, kiuj volas eniri en gimnazion, oni povas akcepti nur tre malgrandan parton, kaj dum por ĉiu ekzameniĝanto sufiĉas, se li ricevas la notojn „3“, el la hebreoj oni akceptas nur tiujn, kiuj ricevis notojn la plej altajn („5“), kaj eĉ inter tiuj perfektuloj oni ankoraŭ faras elekton.

13) „Goj“: ne-hebreo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA ESPERANTISTARO

Ĉu vi scias...

ke U.E.A. estas la unusola Esperantista organizaĵo internacia, kiu sin okupas nur pri la progresigo de Esperanto, klopodante varbi ĉiujn homojn por la lingvo, sen konsidero pri iliaj opinioj religiaj, politikaj aŭ kiaj ajn, tiel plugante la grundon, kies rikolto estas disponebla ankaŭ por la tuta movado!

ke la ĉiujara **Universala Kongreso**, organizata de U.E.A. estas unu el la plej imponaj demonstracioj de la praktika apliko de Esperanto, kaj la **Internacia Somera Universitato** en ĝia kadro senegala manifestacio de la kultura rolo de nia lingvo?

ke la pli ol **2000 delegitoj de U.E.A.** (kun adresoj en la Jarlibro), kiuj donas siajn servojn al siaj kunmembroj—ĉu persone dum vizito, ĉu koresponde—estas io unika en la mondo kaj pravas ankoraŭfoje la solidarecon de la Esperantista familio

ke U.E.A. eldonas ĉiumonatan gazeton **ESPERANTO**, kiu estas modelo de lingvo kaj stilo, kaj informas pri ĉiuj fazoj de la movado, kaj kiun oni esperas pli grandigi kaj plibonigi en la baldaŭa estonteco?

LA JARLIBRO—Aperas en du partoj; la unua parto en la printempo kun detala informo pri la Delegitoj tra la mondo, pri la Esperantistaj organizaĵoj, eldonaĵoj, gazetoj k.s. kaj multaj aliaj aferoj, kiujn oni devus ĉiu Esperantisto. La dua aperas en la aŭtuno kun informoj pri ŝanĝoj en la Delegitaro kaj kun, kutime, nova **fakterminaro**. La jarlibro de U.E.A. estas altvalora konsultilo por la praktika Esperantisto.

ESPERANTO—estas la oficiala organo de U.E.A. Ĝi kutime aperas en la unua semajno de la monato. En ĉiu numero troviĝas interesaj artikoloj kaj lastaj novaĵoj el la tutmonda movado.

La kotizoj estas:

Membro kun jarlibro
Membro-Abonanto
Membro-Subtenanto
Patrono
Dumviva Membro

Por Nederlando:

gld. 3.75
„ 10.—
„ 12.50
„ 50.—
„ 200.—

Por Belgujo:

B. fr. 50.—
„ 140.—
„ 180.—
„ 700.—
„ 2800.—

Aligu aŭ realigu kiel eble plej baldaŭ pagante vian kotizon al la ĉefdelegito aŭ peranto: R.B.L.E., Falconrui 21, ANTVERPEN, pĉk 13.37.67

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.

Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Generala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.

Okdekjara

Antaŭ kelkaj tagoj S-ro M. Jaumotte, edzino de la Liga Prezidanto kaj S-ro Vermandere, administranto de la antverpena Grupo „La Verda Stelo“ vizitis en Mariaburg, la jam de longa tempo malsanan pionirino de nia movado, S-inon Maria Elworthy-Posenaer, okaze de ŝia okdeka naskiĝtago.

Ili alportis al ŝi, kun memorajetoj de la bonaj amikoj, precipe plej koraĵajn gratulojn, kiuj konfirmis la telegramojn senditajn nome de la Liga kaj Grupa estraroj.

S-ro Elworthy-Posenaer diris sian grandan kontentecon pro tiuj montraj de simpatio okaze de evento...por kiu, — laŭ ŝia propra diro, — ...ŝi nenion faris!

Ŝi ĉiokaze kun kuraĝo vivis ofte malfacilan vivon kaj en neniu okazo ŝi forgesas la samideanojn, kiam ili kunvenas iukaze en la lando.

Ni volas rediri al ŝi la bondezirojn, kiujn ĉiuj membroj de nia Ligo, laŭ tiu ĉi vojo, sendas al ŝi.

En unu el la proksimaj numeroj, ni havos okazon, ankaŭ skizi la esperantistan portreton de tiu ĉi veterano, kiun konis en la pratempo ne nur la belgaj, sed ankaŭ multaj eksterlandaj samideanoj.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe **BELGOMINE**

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

Por via MUZIKO,

RADIO kaj GRAMOFONO

nujo kaj Svedujo, klarigante mil kaj unu sciincarojn pri tiu bela lando de Selma Lagerlof. La diversaj renkontoj kaj travivaĵoj kun la lokaj esperantistoj donis apartan ĉarmon kaj koloron al la pli ol trisemajna restado en la skandinavaj landoj. La interesigita publiko dankis per varma aplaŭdo.

La 15an okazis debatvespero pri „Aĉeti je kredito“, enkondukita de F-ino E. De Winter. Ŝi analizis unue la ekeston de la vorto „kredito“ kaj konigis poste sian opinion pri la avantaĝoj aŭ malavantaĝoj de tia sistemo, kiu en diversaj landoj akiras grandan sukceson. La vidpunktoj, kiujn la aŭskultantoj diskonigis poste dum vere vigla debato, estis tre diversaj. Tiel la diskuto daŭris eĉ ĝis post la oficiala parto de la kunveno. Kroma okazintaĵo estis la „Quiz“ prezento de S-ro K. Tjdgat (Quiz-estro), F-ino C. Peeters kaj S-ro W. Deroisy (konkurantoj) pri muzika scienco; klopodo kiu eble instigos al pliaj tiaj.

Dum la 22a la vic-prezidanto, S-ro H. Sielens, direktoro de la nova Internacia Marista Domo, akceptis kaj bonvenigis multajn esperantistojn (eĉ amikojn el Mehleno kaj samideanino S-inon Datoe Toemeng-goeng, el Indonezio, kiu jam diversfoje estis en Antverpeno kaj nun revenis kun familianoj) en la granda halo de la instituto por viziti ĝin: malofa okazajo kiam oni scias ke la oficialuloj eĉ ne ankoraŭ vizitis ĝin. Sub lerta gvidado kun multajn interesajn klarigojn de S-ro Sielens, la ĉeestantoj havis la okazon vagadi tra la oketaĝa konstruaĵo kreita laŭ la plej modernaj kaj

La 40a Universala Kongreso
Bolonjo, 30an de julio - 6an de
aŭgusto 1955

Ni volas atentigi niajn legantojn pri la fakto, ke la minimumaj kotizoj por la Universala Kongreso valoras nur ĝis la fino de la jaro.

Ili estas Liroj 3300 por la Kongresano (Liroj 2350 por la individuaj membroj U.E.A.); Liroj 1650 por edzino de kongresano; Liroj 1100 por junuloj ne pli ol 20-jaraj kaj Liroj 1650 por studentoj.

Inter la la de januaro kaj la 31a de marto, tiuj kotizoj iĝas respektive Liroj 3880, 1900, 1250 kaj 1900 kaj poste Liroj 4500, 2250, 1500 kaj 2250.

Nia Ligo akceptis esti la peranto por la havigo al la L.K.K. de aliĝiloj kaj mono.

Kiel provizoraj informoj pri la restado en Bolonjo, la L.K.K. diras en unua bulteno, ke estas tre malfacila afero informi nun pri tio tre precize; tamen la mezaj restadkostoj estas iomete malpli ol tiuj de la aliaj okcident-eŭropaj landoj.

Hotelĉambroj nun kostas de 650 ĝis 3000 liroj; pensionoj de 1400 ĝis 5000 liroj; loĝejoj ĉe privatuloj de 400 ĝis 800 liroj por lito.

La L.K.K. samtempe atentigas, ke estas preskaŭ senutile mendi unutilajn ĉambrojn. Izoluloj do plej bone interkonsentu kun amiko.

La proksimumaj prezoj por mangado en restoracioj estas: lunĉo 200 ĝis 300 liroj; tagmanĝo aŭ vespermanĝo, de 300 ĝis 1200 liroj, sed la L.K.K. aranĝos komunajn manĝejojn malmultekoste, de 250 ĝis 400 liroj.

La adreso de la L.K.K. estas ĉe C.I.T., Piazza Nettuno, 2, Bologna.

komfortaj normoj. La kreantoj de tiu ĉi modela domo ne forgesis ion; ili pensis pri ĉio: de la praktika ŝudeponejo apud ĉi ĉambropordo, la perfekta funkcio de la kvar liftoj la biblioteko, la restoracio, k.t.p. ĝis al la loĝietoj por la artistoj, malantaŭ la kurteno de la mirinda teatra salono, ĉio estis antaŭvidata. Koraj vortoj de la Prez. S-ro Maur. Jaumotte, varma aplaŭdo de la publiko kaj trinko de bona gliso da biero je tre malmultekosta prezo, estis la impresplena fino de vizito kiun la esperantistoj antverpenaj dum longa tempo memoris.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijk, 4, je la 20.30a h. (1a etaĝo).

Novembro: (memorige) la 5an: Skota

La Beneluksa Kongreso 1955
en Utrecht dum la pentekostaj
tagoj

Kiel oni jam scias la Beneluksa Kongreso 1955a, la triobla jubilea Kongreso, okazos de la 28a ĝis la 30a de majo, do dum la proksimaj pentekostaj tagoj en Utrecht.

Je la momento de la apero de tiu ĉi numero plena kunsido de la L.K.K. estas okazanta, kun la partopreno de la delegitoj de nia lando, S-roj Henri Sielens kaj D-ro Van Gindertaelen.

Unua provizora programo jam estas kunmetata de la nederlandaj delegitoj, S-ro G. H. Koudijs (Paulus Potterstraat 16); F-ino A. J. M. Perk, sekretariino (Paulus Potterstraat 18); F-ino C. Brouwer, kasistino (Croeselaan 379bis) kaj de la lokaj kunhelpantoj.

Kelkaj aferoj tamen ne jam estas definitive fiksataj, sed estas la nepra deziro de la L.K.K. ke definitiva programo aperu en la numero de decembro.

Kiel kutime estas antaŭvidataj akcepto en la urbdomo, kiu verŝajne okazos jam la sabaton posttagmeze, kvankam la horo ne jam estas fiksita; balo, ankaŭ sabate; Diservoj, kunvenoj de la diversaj Ligoj, rondveturo aŭ rondpromeno, oficiala fotografaĵo, festa manĝo kaj arta vespero, ĉio dimanĉe.

Por la lundo estas antaŭvidata aŭtobusa ekskurso al la nacia parko „Hoge Veluwe“.

La presigo de la aliĝilo suferas kelkajn malfacilaĵojn pro la antaŭvidataj influoj de la salajro-plialtigoj sur kelkaj prezoj.

La kotizo komoreneble restos senŝanĝa: Fr. 40 ĝis la fino de la jaro; Fr. 50 de la 1a de januaro ĝis la 30a de aprilo kaj Fr. 60, ekde la 1a de majo.

La antaŭvidata prezo de la dimanĉa festmanĝo estas Fr. 100, inkluzive la trinkmono; de la ekskurso Fr. 60 kaj de la „Gelderse Koffiemaaltijd“ aŭ lunĉo Fr. 60.

La prezoj de la tranoktado inkluzivos la plenan matenmanĝon kaj la servomonon kaj estos, por unu persono kaj por unu nokto, tre diversaj, inter Fr. 60 kaj Fr. 155.

Sed nia proksima numero enhavos pli detalajn informojn.

Intertempe, ĉi povas pagi sian kongreskotizon al sia grupa kasisto, kiu interrilatos kun S-ino Plyson, kiu daŭrigos la flegon de kongresaj aferoj.

Vespero al kiu partoprenos S-inoj G. Debacker kaj J. De Hondt, F-ino M. Moriamé kaj S-ro H. De Hondt, anstataŭos la ĉiunmenatan Parolatan ĵurnalon; la 12an: Parolado de S-ino R. Leĉat pri „Morala Rearmigo“; la 19an: Mitulvespermanĝo kaj la 26an: Teatra Elsendaĵo.

Decembro: la 3an: Parolata ĵurnalo kaj Sankta Nikolaa Festo; la 10an: Parolado

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaĵ prezoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista“,
Tel. 314.59

panta en Bruĝo, vizitis la kunvenon de la 28a de septembro, agrabligatan per portretludado, en kiu jam partoprenis la novaj gelernantoj.

La 5an de oktobro jam estis donataj la 7a kaj la 8a lecionoj de la elementa kurso, post kio aranĝoj estis prenataj por la unua vintra balo de la grupo.

Dum la kunveno de la 12a de oktobro, post la 9a kaj 10a lecionoj, la multaj ĉeestantoj amuziĝis per portretludado.

Sabaton 16an estis granda tago: tiam okazis la unua vintra balo de la grupo, tiun ĉi fojon en la luksaj salonoj de la hotelo „Memline Palace“. La sukcesoj estis, se eble, ankoraŭ pli granda ol tiu de ĉiuj estintaj baloj kaj multaj partoprenintoj jam informiĝis pri la dato de la dua balo.

Pri tiu evento estis detale raportata dum la kunveno de la 19a de oktobro, je kies komenciĝo estis donitaj la 11-a kaj la 12a lecionoj de la elementa kurso.

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj. P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.

Suoj — Teksajoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86

J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66

Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09

Henny de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj

Roger Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Ĉiuj anoncoj kaj reklamoj en tagĵurnaloj

K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07

R. Vanistendael, Dambruggestraat, 234, Antverpeno.

Okulvitroj — Rabato de 5 % por la membroj.

CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.

Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.

Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59

H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo. Reklamoj. T. 81.48.47

H. Jacques, Lange Beeldkensstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38

Verdijck, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiuj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07

P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55

Y. Amerijckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj.

M. Blajwas, Lange Kievitstraat 80, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3

Farmaciisto N. Nelis, Meise

„BONBONS SWINNE“, 77, rue de Nieuwenhove

Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse

CARRELAGE „Carrart“, 19, avenue de Saŭo

Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57

Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck

Tinkturejo, senmakuligejo „DEX“ 16, rue Esnest Laude

15.26.01

59.13.73

44.57.36

21.10.98

21.74.49

15.96.97

11.71.03

15.28.29

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde je la 20a, en la sidejo: „Gouden Hoorn - Cornet d'Or" Simon Stevinplaats, 2.

Ĝis la 14a de decembro, la unua horo de ĉiu marda kunveno estos dediĉata al leciono de la elementa kurso.

Dum la dua horo de la mardaj kunvenoj:

Novembro. - (Memorige). - Dimanĉon 7-an, je la 9¹/₂ matene, je la angulo de Steenstraat kaj Zilverstraat: Kunveno ĉirkaŭ la grupa flago por partopreno en la Funebra Sekvanto ĝis la Milita Tombejo. Mardon, la 9an: Portretludado. **Ĵaŭdon** 11-an: Tago de la Militino: Film-vespero por la grupanoj kun gefamilianoj kaj geamikoj; 16-an: Triopa interparolado; 23-an: Kartludado. 30-an: Parolata gazeto.

Decembro: 7an: Muzika vespero; 14-an: Zamenhofa vespero. 21an: Ekzameno pri elementa grado; 28an: Surpriza vespero: ĉiu alportu nekonatan premion.

Gratuloj

Al F-ino Maria HERREWEGHE, membrino de la Bruĝa Grupo, kiu la 24an de aŭgusto fariĝis S-ino Rody VISMARA.

Al S-ino DENYS-TACQUET, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la naskiĝo de filo: Fabien (9/9/54).

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

BRUSELO

Esperantista Bruselo Grupo

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La jara festeno estis organizata tiun ĉi fojon honore de S-ro D. Van der Stempel.

Tuta grupo el Antverpeno kaj S-ro De Kegel el Charleroi ĉeestis ĝin kun la multnombraj lokaj membroj; kaj estis en la plej bona atmosfero ke ĉiuj gustumis bonegajn pladojn en la restoracio „Au Moulin d'Or". dimanĉon, la 24an de oktobro.

Je la horo de la toastoj D-ro Kempeers, prezidanto de la Grupo, diris al sia malnova amiko, kiun li konas jam ekde la infanjaroj, sian grandan simpatian. S-ro Castel skizis la esperantistan karieron de la festito kaj S-ro Verstraeten, nome de la antverpenanoj kaj S-ro Nelis, nome de la lernintoj de S-ro Van der Stempel, alportis al li plian saluton.

Fine, S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., prezentis la gratulojn de ĉiuj sam-

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj estas sendotaj al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20a de novembro 1954).

SOLVOJ

177. vertebrulo, ŝipveturo, malpermesi, teretaĝo, sanatorio, verborita, piediranto, partopreni, mangokarto, vegetarano, muskaptilo, malkonfesi, stenografi, korktirilo, koketulinio, konkuranto, poŝt-ranĉilo, posedanto, mangrenado, liber-tempo, komedianto, kompatinda, kargo-boato, blondulino, graciulino, bataalkampo, apotekisto, litkovrilo, pensionulo, kamentubo. Rusto mangas feron, ĉagreno la koron.

178. *Hor.*: likva, brank, rel, klabo, estri, se, akaci, ad, vil, ten, mastrum, gap, emi, ren, astmo, krisp;

Vert.: fleks, agraf, lev, akra, impeti, bala, barok, spron, alt, eblec, ronki, situ, last, emerit, ran, oksid, miopa.

179. KUNMETU

30 naŭliterajn vortojn el la 90 subaj litergrupoj. Iliaj triaj literoj samorde legataj formas proverbon.

Litergrupoj: ajo, ajo, alm, api, apo, aro, aro, bro, ciz, ĉtr, dfr, dli, elt, ema, ena, eni, eno, ent, eni, erv, erv, eti, fet, fla, fri, gfr, gno, gul, gvi, igi, iĝi, iĝo, iki, ilo, imi, int, ipo, ist, ita, kap, kci, kli, kra, kri, kro, kup, kus, lib, miĝ, neo, nkm, obs, ole, ono, opl, org, ors, ozp, pav, pie, pon, pos, pre, pri, pro, rea, reg, sil, spe, sto, sto, suk, tik, tin, tol, tri, tsi, ulo, ulo, ulo, uri, urn, ŭpo, van, vap, vat, vel, ven, vet.

Klarigo de la serĉotaj vortoj: 1. ĝi troviĝas en lito; 2. ĝi sekrecias valoran fadenon; 3. kelnero ricevas ĝin; 4. spontanee; 5. plekti fadenon per speciala ilo; 6. aparato por refreŝigi la aeron; 7. esti bilde resendata; 8. klare determini; 9. ĝi estas postlasita de io pasinta. 10. sin enmiksi; 11. politikisto kontraŭanta antaŭenirajn partiojn; 12. malcedema per-

ideanoj en Belujo kaj faris alvokon por la jubilea festoj, kiuj estos plia okazo por festi la multajn amikojn, kiuj, same kiel la festito de hodiaŭ dum multaj jaroj, oferis ĉion por ke nia movado vivu.

Ni aldonu ke al la honorigato estis transdonata bela donaco kaj al S-ino Van der Stempel bela florkorbo, kun koraj vortoj de dankemo ankaŭ al ŝi.

S-ro Van der Stempel emociigite dankis en plej lerta kaj humora maniero.

Estis bela festo, kiun ĉiuj ankoraŭ longtempe memoros.

PROGRAMO: Novembro (Memorige): la 15an: Perfekta kurso; la 22an: Parolado de S-ino Plyson pri „Postkongreso en Leeuwarden"; la 29an: Filmvespero (D-ro Kempeers).

Decembro: la 5an (dimanĉo): Sta. Nikola Festo; la 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: Zamenhofa vespero; la 20an: Perfekta kurso; la 27an: Kristnaska festo.

sono; 13. malmilde trafi per piedo; 14. frapo al ies vizago; 15. li faras stratojn; 16. li ne plenumas oficialan rolon; 17. ŝatanta atentigi pri malbonaĵo; 18. personoj estrantaj la aferojn de la ŝtato; 19. personoj kiuj aĉetas kutime ĉe iu butikisto; 20. antaŭdiraĵo; 21. moviĝi dank' al vento; 22. ne seka; 23. libera; 24. malriĉulo kelkfoje faras tion; 25. trafikilo; 26. facile ekbrulanta; 27. preteksto; 28. fiago; 29. muzikisto; 30. porturista presaĵo.

180. KRUCVORTENIGMO

Horizontale. 1. Oni buterigas ĝin; parto de preĝejo(R); pronomo. 2. ŝtono(R); konfuzaĵo(R); eligi nevideble(R). 3. devenanta el malproksima lando(R); prefikso; kare ŝati. 4. amerikano(R). 5. sentanta maltrankvilon pri la fideleco de amato; arbeto kun pikaj folioj(R). 6. plato el metalo. 7. strando; sincere respekto plena al Dio(R); loko en la haŭto, malmoliginta pro fro-tado(R). 8. parto de vegetaĵo(R); jar-kalkulo(R). 9. signo de venko(R); komenciĝo(R). 10. ne senpere(R). 11. leviĝi kaj malleviĝi kiel faras la maro(R); ekskrementa likvaĵo(R). 12. frakcio; malbone farita.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Vertikale. 1. io farita el nenio(R); malgranda taĉmento da soldatoj(R). 2. grandega ŝtono(R); birdo(R). 3. el-peli iun el la patrujo(R); sameco de sentoj inter pluraj personoj. 4. postuli tujan agon(R); membro(R). 5. ne preciza(R); tio per kio oni kolerigas iun. 6. ĝi gustigas la mangajojn(R). 7. densaj akvovaporoj; neaŭtentika(R). 8. komuna diro(R). 9. plenda ekkrio(R); ekstrema flanko de armeo; malfacile produkti iun verkon(R). 10. ne per maŝino, sed per la manoj; konjunkcio; nombro. 11. en la pasinta tempo; facile kompreneble; participe finaĵo(R); 12. speco de agato(R); konciza.

Verantw. uitgever: Rega Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk.